ESPERANTO
INTERNACIA LINGVO

# ELNA-BULTENO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 6(71) Januaro 1971

### ELNA-KONGRESO EN SAN ANTONIO, TEXAS

De la 30a de junio, ĝis la 4a de julio, 1971, la Esperanto-Klubo Von Nimitz, de San Antonio, Texas, invitas ĉiun Esperantiston ĉeesti la 19an Kongreson de ELNA. La kongres-centro estos la Hotelo Gunter, en la urbocentro, kaj oni raportas, ke la kostoj estas similaj ol tiuj en la pasinta kongreso en San Francisco. La vigla loka klubo, nomita laŭ la unua Esperantisto en la urbo, D-ro Von Nimitz, kiu organizis la unuan grupon, informas al ni, ke San Antonio estas varma urbo somere, sed havas sufiĉajn modernaĵojn. Ĉiuj komercaj konstruaĵoj havas aerumadon, por ke vi povas esti komforta dum la kongreso. Komitatanoj tie inkluzivas la jenajn: D-ro David Keedy, S-ro Robert Leahy, S-ino Peggy Schneider, kaj S-ro Louis Tutt.

### SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

La fina plensemajno en februaro estos la okazo por "amikeco trans limoj," la 21an ĝis la 27a de februaro, 1971. Komitato de ELNA, kondukita de Ken Thomson, sekretario, Poŝtkesto 663, Houston, Texas 77001, prizorgas la detalojn. Materialoj pri la signifo kaj planitaj aferoj estas haveblaj ĉe la supra adreso, ekzemple belaj salutkartoj, unu po 2 cendoj, aŭ 50 kontraŭ unu dolaro, kaj malaltkostaj trikoloraj afiŝoj. La legantaro de ELNA-Bulteno devas loke antaŭenigi la "semajnon," kaj bonricevi la konkretajn proponojn, kiujn Ken Thomson baldaŭ sendos kaj al grupoj, kaj al unuopaj ge-Esperantistoj.

### NOVAJ NORD-OKCIDENT-USONAJ ESPERANTO-KLASOJ

En Lincoln High School, Portland, Oregon, studas 25 studantoj, el tri mezlernejoj, Esperanton. La instruistino estas Hazel Heusser. En la Publika Biblioteko de Portland kunvenas klasoj je la komenca kaj la mezgrada nivelo, instruitaj de Jim Deer, Anne Whitteker, kaj Larry McLaughlin. S-ino A. Zahler ankaŭ instruas Esperanton en biblioteko por la "American Association of Retired Persons." Ŝi havas matenan klason por komencantoj, kaj posttagmezan klason por altgradlernantoj. Doris Page instruas ĉe la Kultur-Centro, kaj por plenaĝuloj, kaj por junuloj. En Salem instruas Joe Gamble, ĉe Chemeteka Community College. S-ro Gamble ankaŭ, komence de januaro, 1971, instruos klason fakultative ĉe la Universitato de Oregon, en Eugene.

### MONTRAĴO PRI ESPERANTO ĈE INTERNACIA FESTO

Dum la 6a ĉiujara Internacia Kunlaborada Festo, la 9an de januaro, 1971, en Los Angeles, havis la Esperantistoj montraĵon, por demonstri la ĉie-eston de nia lingvo tutmonda. La kunlabora konsilantaro kunigas humanistajn grupojn por daŭrigi la ideojn de la Jaro de Kunlaborado de la Unuiĝintaj Nacioj.

### EDUKISTOJ AŬDIS PRI ESPERANTO

Rezumo de klera studo pri Esperanto, kiel sociala kaj lingvistika movado, verkita de D-ro P. G. Forster, de la Universitato Hull, Anglujo, aperis en la publikigo de "Sociological Abstracts," dum 1970.

# ELNA-BULTENO

| | | | |
|---|---|---|---|
| **KUNFONDINTOJ** | Donald Munro<br>Rodney Ring | **ADRESO** | ELNA-Bulteno<br>Muhlenberg College<br>Allentown, Pa. 18104 |


NOVAJ ESPERANTO-KLASOJ EN SUD-ORIENT-USONO

En St. Petersburg, Florida, D-ro Amiel instruas Esperanton posttagmeze ĉe la "Mirror Lake Adult Center," kaj S-ro Duffield instruas klason vespere ĉe la Junior College. Kiel parto de speciala programo por elstaraj infanoj, ĉe la Universitato de South Florida, Tampa, S-ino Giguere havas sabatan mateno-klason. Printempe la Universitato havos plenaĝulan klason.

ESPERANTO EN LA KAPITOLO DE PENSILVANIO

S-ro William Simpson, kiu ankaŭ instruas nian lingvon fakultative por Elizabethtown College, nun kondukas klason en Harrisburg, la Ŝtata kapitolurbo. Ĝi estas oficiala parto de la Plenaĝula Vesper-Lernejo, ĉe la Central Dauphin High School.

ĴURNALA RAPORTO PRI AFEROJ POR INFANOJ EN ESPERANTO

En Dalton, Massachussetts, la NEWS RECORD raportis pri "Grajnoj en Vento," la fama infanrondo, kiu estas internacia interŝanĝo de infanaj verkaĵoj kaj artfaraĵoj. Ekzempleroj estis portitaj al la loka lernejo de S-ino Joyce Boschen, artinstruistino.

RELIGIO KAJ ESPERANTO EN LOKA GAZETO

Esperantistoj en orienta Usono, kiuj interesiĝas ne nur en la lernado, parolado, aŭ legado de la internacia lingvo, sed, kiuj sin dediĉas al religio, precipe al katolikismo, abonas al Bulteno, kiu nomiĝas "Kiu." La redaktoro estas: Edwin C. Harler, 47 Hardy Road, Levittown, Pa. 19056.

ELSTARA NOVA LIBRO HAVEBLA

Bela libro, Por Pli Bona Mondo, de Sylla Chaves, Funacao Getulio Vargas, Rio de Janiero, 1970, verkita de plentalenta brazila poeto, estas mendebla ĉe la libro-centroj. La aŭtoro nun estas ĉe la Universitato Stanford, kaj la samideanoj tie en la distrikto, invitis lin al kunsidoj, kie li deklamis siajn poemojn, kaj pritraktis tiun ĉi verkon. La 259-paĝa libro enhavas tre lertan analizon de la arto de traduko, bonegajn ekzemplojn de la supereco de la internacia lingvo, valorajn poemojn originalajn, kaj tradukojn de originalaj poemoj, de niaj plej famaj poetoj, de Zamenhof ĝis Boulon kaj Auld (tra la tuta verko ĉiu paĝo paralele estas portugale kaj Esperante). Tiu ĉi havinda kolekto havas grandan meriton. La kosto estas nur $3.00.

BONA SUGESTO SENDITA AL MUZIKISTO DUKE ELLINGTON

D-ro David M. Keedy, San Antonio, Texas, ano de la Esperanto-Klubo Von Nimitz, verkis bonan leteron, kaj sendis ĝin al la fama muzikisto, Duke Ellington, post koncerto tie, en novembro, 1970, je la fino de kiu la muzikisto, por fermigi la programon, elparolis la frazon, "Ni amas vin freneze," en pluraj naciaj lingvoj. Kompreneble la sugesto de D-ro Keedy estis, ke S-ro Ellington estonte inkluzivu la saman frazon en Esperanto ankaŭ.

* * * * * * * * * * * * * * * * * *

La redaktoro de ELNA-Bulteno bedaŭras, ke tiu ĉi numero ne havas la spacon por du rubrikoj, "Artikoloj," kaj "Por Studantoj." Paciencu! La decido alternadi la du ELNA-publikaĵojn postulis ĝin; sed nur ĉifoje.

ESTONA VERKISTINO ELDONIS LIBRETON

S-ino Benita Kärt, kiu verkis originalajn rakontojn, poemojn, kaj artikoletojn, kiuj aperis en "Norda Prismo," "Nuntempa Bulgario," kaj "Planteto," donis permeson al amikino usona, Anette Greenland, publikigi kolekton de siaj belaj poemoj. La titolo estas "Miozoto," kaj oni povas mendi ĝin kontraŭ 50 cendoj: Anette Greenland, 803 North 3rd Street, McGehee, Arkansas.

PLUAJ HONOROJ POR S-INO ELIZABETH RANKIN

S-ino Elizabeth Rankin, kiu mortis en tragika aŭtomobilakcidento, la 4an de oktobro, 1970, pluvivas en la Esperantistara memoro. La samideanaro en San Francisco (SFERO) kreis fonduson en ŝia nomo. Kaj nun la Helena Konferenco Esperantista de Ateno, Grekujo, kiu antaŭ longe akceptis ŝin, kiel unuan honoran membron, pere de aliĝintara rezolucio, nomigis la Biblioteko-Ĉambron (domo de la kultura klubo de la Nacibank-oficistoj) la "Ĉambro de Elizabeth Rankin." La mortintino instruis la anglan lingvon en Grekujo dum 1967-8, kaj ŝi laboris kun la anoj de la Tuthelena Esperanto-Korporacio, kun kiuj ŝi eĉ tiam ĉeestis la universalan kongreson en Madrid. Ŝia amikaro plusentos la mankon, sed ankaŭ nun estas fieraj, pro la honoro, donita al la kara amikino.

MALSANO EN ORIENTA USONO

S-ro René Oehler, la nova prezidanto de la Esperanto-Klubo Donald Munro, eniris la malsanulejon en Flemington, N.J., la 2an de decembro, 1970, por suferi gravan operacion. Post naŭ tagoj li hejmen iris por restatiĝo kaj ripozo, kaj li povis konduki la aferan kunvenon de la klubo, la 7an de januaro, 1971. La anaro ĝojegis.

MALĜOJAJ ANONCOJ

Antaŭ kelkaj semajnoj, ni lernis, ke bonekonata Esperantistino en Seattle, Wash., Helen Higbee, mortis. Ĉiuj tie sentas la mankon de ĉi tiu movadpartoprenantino bona.

Ni ankaŭ lernis, ke la prezidantino de la Esperanto-Asocio de Portland, Oregon, Gerry Peterson, havis gravan operacion. Ni certe esperas, ke ŝi jam resaniĝis.

ESPERANTISTO KONTRIBUIS AL GAZETO

La Gazeto "Textile Labor" (TWUA-AFL/CIO) publikigis en la decembra numero, 1970, leteron al la redaktoro, kiu plenigas trionon de paĝo, kiu temas pri la origino de la minimuma salajro, kaj, kiu estis skribita de Conrad Fisher.

PETOJ EL LA ELNA-REDAKTOROJ

Bonvolu helpi en la plialtnivellevigo kaj la informdisvastigado. Verku artikol(et)ojn en Esperanto por la ELNA-Bulteno, kaj sendu interesplenajn novaĵokazlistojn al la Novaĵletero. Ili devas atingi la redaktoron la 5an de la publikiĝmonato. Kaj ne forgesu konstante sendi ekzemplerojn de la lokaj gazetoj, kaj al Novjorko, kaj al Allentown, Pa.

NOVAĴO EL LA KORO DE LA LANDO, CHICAGO, ILLINOIS

Ĉiun merkredon, ĉe la Universitato Loyola, okazas Letervespero, por helpi komencantojn lerni Esperanton per skribado de leteroj al eksterlando. Esperanto-klasoj ankaŭ komencos la 21an de januaro, 1971, ĉe la YMCA, 211 W. Wacker Drive.

Kaj Zamenhofa Bankedo oficiala okazis vendredon, la 11an de decembro, 1970, ĉe la Hotelo Oak Park. Post bongustuma manĝo, oni ĝuis programon, kiu inkluzivis kelkajn "legadojn" de S-ino Alexandria Russell, kiu estas konata spertulino de manskribaĵo.

ALIAJ ZAMENHOFAJ FESTOJ

En Portland, Oregon, la 21an de decembro, 1970, okazis kunveno de la loka Esperanto-Asocio, por doni omaĝon al la kreinto de la lingvo. La programestro estis S-ro Richard Cook. Ĉiuj partoprenis pensplene.

La 6an de decembro, 1970, en San Francisco, okazis la plej longa de tiaj aferoj. Ĝi estis SFERO-Bankedo. En loka restoracio, ĝi havis la temon,"Por Pli Bona Mondo" (Vidu novaĵon pri S-ro Chaves), kaj la program-gvidanto estis Bob Williams, Esperanto-instruisto de Delta College, Stockton, Cal. Oni aŭdis bonvenvortojn kaj analizon de la stato kaj celoj de SFERO, parolitaj de Gary Mickle, de la Universitato de California. Fama kantgrupo "Principaro de Frostavallen" kantis, kaj la ĉeestantoj tiam renkontis la personojn el la gastlisto (instancoj). Martha Walker, bibliotekistino, kantis kun baritona ukelelo, kaj la Esperanto-Klubo de loka eklezio, prezentis mokverkon, uzante, kiel rololoj, Jay Berry, Lee Brooks, Doris Whitteker, Pierre Duvaulle, Bob Walsh, Betty O'Neil, kaj Ray Landis. S-ro Harold Dreyer, publiklernejinfaninstruisto, el El Cerrito, priparolis la Esperantofestojn tutmonde. Diplomita studento, lingvistiko, de la Universitato de California ĉe Berkeley, Scott Aleshire, prezentis originalan poemon. Doris Vallon kaj Bob Bailey prezentis legadon el la profunda libro, "La Profeto," de Kahlil Gibran. D-ro Chaves, profesoro de la fonduso Getulio Vargas, Rio de Janiero, legis el sia nova libro (vidu novaĵon). La omaĝo al D-ro Zamenhof estis donita de D-ro B. J. Balcar, instruisto de la Ĉeĥa lingvo en la lingvo-instituto en Monterey, kaj fama muzikisto kaj edukisto. Ĉiuj dankis Jim kaj Ella Gibson, pro iliaj laboro, kaj dankis al SFERO - kaj al D-ro Zamenhof.

NOVA ESPERANTO-DISKO HAVEBLA

Oni povas mendi la diskon, #NO592, Muzilo, kun la kantoj de junula grupo en Vroclavo, Pollando, ĉe la jena firmao en Chicago: Polish Record Center of America, Jan Wojewodka, 3055 North Milwaukee Ave., Chicago,Ill. 60618. S-ro Wojewodka vendas la diskon je du dolaroj.

ELNA-SEKRETARIO EKSPOZIIS EN LINGVINSTRUISTA KONFERENCO

Dum la aŭtuna konferenco de la Penn'a State Modern Language Ass'n-konferenco en Erie, Pa., oktobro 10a, Conrad Fisher reprezentis ELNA-AATE per montrado de libroj, ktp., en nia lingvo. Ĉiuj rigardis kaj diskutis ĝin.

ESPERANTO-ARTIKOLO PRI RADIO

La artikolo "Kiel plibonigi la Akceptadon de la Disaŭdigoj sur la Mallongaj Ondoj" estas senpage havebla de la pola Radio-Esperanto-Redakcio, P.O.46, Varsovio, Pollando. Ankaŭ, ili kopios surtiujn sonbendajn programojn en sia arkivo. Nur sendu la sonbendon al la supra adreso; ili deziras ricevi sonbendojn pri lokaj aŭ regionaj movadoj.

BELA UZEBLA ESPERANTO-MONDMAPO

Nun vi povas posedi la mapon pri la mondo en nia lingvo, kontraŭ $1.25. Eldonita de la Internacia Instituto por la Oficialigo de Esperanto, kun elekto de loknomoj farita de speciala internacia komisiono por ordigo de geografiaj nomoj, konsistanta el elstaraj anoj de la Akademio de Esperanto kaj geografoj. Bonega kaj trafa ilo por montri la universalecon de nia lingvo. Usona reprezentanto: Conrad Fisher, Route 1, Meadville, Pa. 16335.

## OFICIALAĴO

AL LA ELNA-ESTRARO: La Gvida Komitato de la ELNA-Estraro aprobis la jenan proponon:

I--70--71--Ke ELNA akceptu la inviton de la Esperanto-Klubo Von Nimitz de San Antonio okazigi la 1971an ELNA-Kongreson en tiu urbo. (Vidu novaĵon.)

Brazila 20-jara gitaristo kaj akordionisto deziras interŝanĝi bildkartojn pri muziko kaj kino. José Meira Mendonça, Avenido Rio Branco 802, Natal, Rio Grande de Norte, Brazilio (Brazil).

Bulgara korespondpeto: Georgi Asenov Ĉaprozov, Vilaĝo Dibiĉ, Distrikto Ŝumenski, Bulgario (Bulgaria).

Du 16-jaraj litovaj amikinoj volas interŝanĝi poŝtmarkojn kun usonanoj, kaj lerni pri la juna vivo en usono. Sama adreso: Vilnius 34, Liepyno 16-6, Litovujo (Lithuania), USSR.

Hungara korespondpeto: Bėla Nagy, Råkóczi, U.39, Oroszlány, Hungario.

Japana profesia patent-advokato volas korespondi kun samprofesiuloj; li traktas diversajn enketojn en japanujo, estas agento de patent-petoj,ktp. S-ro Kenzo Hotta, Poŝta Kesto 3, Yokahama, Japanujo (Japan).

Rumana korespondpeto: Asztalos Lajos, Str. Cotita no.2, Cluj, Rumanio, P.M. (Roumania).

Laŭ la plano "Geonkloj Esperantistaj" volas korespondi kun geviroj en usono. Infanoj: Esperanto-Rondeto. Ĉe Porinfana Sanitorio, Strato Polanki, 119-121, Gdansk 5, Pollando (Poland).

70-jara Esperantisto kiu deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, enlistiĝis je ete malĝusta adreso en la pasinta numero de ELNA- Bulteno, nun atendas: S-ro Heinrich Bense, Obere Strasse 1, 6081 Rotterode, Orient-Germanujo (East Germany).

Pola poŝtmarkamanto kolektas pri la jenaj temoj: pentrarto, faŭno, bestoj, birdoj, insektoj, flaŭro, floroj, plantaĵoj. Li ankaŭ interesiĝas en la Apolo-Programo, surluniĝo, kaj aŭtoj. Interŝanĝe sendu laŭ via deziroj, novajn aŭ uzitajn poŝtmarkojn: Andrzej Alberski, Skarzysko-Kammienna 2, Strato Stokowa 5, Pollando (Poland).

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

O F I C I A L A   E L N A - J E N - K O R E S P O N D S E R V O - P E T O

Bonvolu respondi al la demandaro, kaj sendu ĝin al F-ino Ellen Lewis, 15 Salisbury Road, Brookline, Massachusetts 02146.

NOMO________________________ AĜO AŬ AĜOGRUPO____________

ADRESO________________________________________

GEEDZA STATO__________________ INFORMOJ PRI FAMILIO, KTP.________

__________________________ STUDFAKO, LERNEJO, METIO, PROFESIO,

OKUPO, KTP.____________________ FLANKOKUPO, INTERESOJ, TEMOJ, PRI

KIUJ VI KORESPONDOS, KTP.__________________________

____________________________________________

## OFICIALA ELNA-ADRESARO

**INFORMCENTRO OKCIDENTA**
410 Darrell Road
Hillsborough, Cal.
94010
(415) 342-1796

**INFORMCENTRO NOVJORKA**
156-5th Ave.Rm. 821
New York, N.Y.
10010
(242) 989-2716

**PREZIDANTO**
Francis E. Helmuth
5526 Beaumont Ave.
La Jolla, Cal. 92037

**VICPREZIDANTO**
Mark Starr
3940-47th St.
Long Island City, N.Y.
11104

**SEKRETARIO**
Conrad Fisher
Route 1
Meadville, Pa.
16335

**KASISTINO**
Peggy Linker
1414 Monroe
Walla Walla, Wash.
99362

**UEA-ĈEFDELEGITO**
Armin Doneis
P.O. Box 105
Pharr, Texas
78577

## ELNA-ESTRARO-DIREKTOROJ

Allan Boschen (ĝis 1971), 195 Partridge Rd., Pittsfield, Mass. 01201; Armin Doneis (ĝis 1971), Box 105, Pharr, Texas 78577; Leslie Green (ĝis 1971), Box 4162, Covina, Cal. 91722; Jonathan Pool (ĝis 1972), 5238 S. Kenwood, Apt.1, Chicago, Ill. 60615; Margot Gerson (ĝis 1972), 29 Windsor Rd., Great Neck, N.Y. 11021; David B. Richardson (ĝis 1972), Box 81, Eastsound, Wash. 98245; William H. Schulze (ĝis 1973), 410 Darrell Rd., Hillsborough, Cal. 94010; Dorothy Holland (ĝis 1973), 1010 Crestwood Pl., Santa Barbara, Cal. 93105; James Deer(ĝis 1973), 12946 N.E. Hancock St., Portland, Oregon 97230.

---

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA
156 FIFTH AVENUE, NEW YORK, N.Y. 10010

NON-PROFIT ORG.
U. S. POSTAGE
Paid
Kutztown, Pa.
Permit No. 8

RETURN POSTAGE GUARANTEED

ADDRESS CORRECTION REQUESTED